

bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
ĈE KULTURCENTRO DE ONV 1

MARTO 1961

N-ro 59

La tria kvinjarplano PLANO DE DISFLORADO DE LA SOCIALISMA ĈEĤOSLOVAKIO

La popolo de ĉeĥoslovaka socialisma respubliko komencis ekde la 1-a de januaro 1961 plenumadi la taskojn de la tria kvinjarplano de disvolvo de la nacia mastrumado.

Karakteriza trajto de disvolvo de la nacia mastrumado dum venontaj kvin jaroj estas la fakto, ke okazos plua rapida progreso de produktaj fortoj en la lando, kio ebligos ankoraŭ pli bone kontentigi la kreskantajn konsumajn postulojn de la maturiĝinta socialisma socio.

Dum tiu ĉi tempo la produktado devas disvolviĝi tiel, ke la kreskado de la nacia enspezo atingu pli ol 42 %, dank' al kio oni povos plialtigi personan konsumon de la loĝantoj post kvin jaroj je 30 %, plue mallongigi la laborsemajnon tiel, ke ĝi havos en la jaro 1965 42 horojn.

Plej grava ĉenero denove estos industrio, kiu altigos sian produktadon je pli ol duono, kompare kun la nuna jaro. Decidan rolon ludos kemio, kiu preskaŭ duobligos la volumon de sia produktado, fariĝonte unu el la ĉefaj fakoj, kaj maŝinproduktado, plue konsiderata kiel la plej grava industria branĉo. Se Ĉeĥoslovakio jam nun estas en la mondo konsiderata kiel grava maŝinkonstruanta lando, oni povas esti certa, ke per la plialtigo de la maŝinproduktado je 76% tiu ĉi pozicio estos plue fortigita. Elkreskos novaj fabrikoj kaj oni enkondukos produkton de novaj produktaĵoj, neniam en historio ĉe ni fabrikataj, kiel ekzemple la artefarita kaŭĉuko, novaj specoj de plastika materialo kaj kemiaj fadenoj, maŝinoj por aŭtomata produktado, altproduktivaj energimaŝinoj ktp.

Ankaŭ la agrikulturo ne rajtas malfruiĝi kompare kun la rapida progresado de la industrio. Per altiĝo de agrikultura produktado je 22-23 % la nivelo de nia agrikulturo alproksimiĝos al tiu de statoj kun plej modernigita agrikulturo kaj ĝia signifo en la nacia mastrumado konsiderinde kreskos. Helpos la industrio, kiu per liverado de mekanikaj rimedoj altiĝos la nivelon de mekanizado de la laboroj kaj per liverado de artefaritaj sterkoj certigos la plialtigon de pohektara rikolto tiel, ke produktiveco de la agrikultura laboro kreskos pli ol je duono kompare kun ĉijara stato.

Ĉeĥoslovakio eniras la novan epokon, epokon de konstruado de matura socialisma socio, kio kondukos al novaj formoj de certigado de vivnivelo, kiu ĉiam pli akre diferencigos de la vivostandarto de loĝantaro en kapitalismaj ŝtatoj. Iom post iom oni en ĉiam pli granda mezuro konsideros signifon de tiuj elementoj, kiuj havos karakteron de komunisma kontentigado de sociaj bezonoj. Ĉeĥoslovakio fariĝos unu el la landoj kun plej alta vivnivelo en la mondo.

Vladimír Cihlář

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1, Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.
--

KARAJ LEGANTOJN!

Komence de la tria kvin jara plano ankaŭ nia Bulteno aperas en nova mantelo kaj duobligita amplekso, pri kio atentigi vin povus ŝajni nebezona. Sed ni konsideras, ke estas necese informi vin pri kialoj, kiuj gvidis al tiuspeca decido.

Dumlastaj monatoj kultura aktiveco de EKP tre malfortiĝis. Tio estas fakto neniel surpriza, ĉar la samaj personoj, kiuj dum jaroj preskaŭ monopole faris kulturen programon de la klubo, neeviteble devis iam elĉerpi siajn temojn prezentatajn ĉiusemajne al la sama publiko, konsistanta el 30 ĝis 50 daŭraj "ŝtamgastoj" de la merkredaj kunvenoj.

Sekve de tio kultura laboro koncentriĝis en la gazeto, kiu havas multe pli vastan kontakton kun nia membraro /aperas en pli ol 2200 ekz./, povas alproksimiĝi al ni eĉ izolulojn en la movado, reakiri por la klubo novan junan sangon. Bulteno fariĝis iom plibeligita spegulo de kultura laboro en nia klubo, jes, ĝi devas nun esti heroldo de novaj fortoj kaj entuziasmo esperantista.

Tial nova mantelo printempa kaj duobla enhavo. Sed ne restas nur ĉe tiu tasko. Esperantista Klubo en Praha dum sia ekzistado pli ol duoncentjara atingis konsiderindan famon en la movado kaj vizitantoj de Praha el la tuta mondo daŭre kun sincero memoras siajn amikojn en la lando al ili jam ne plu fremda. Tiuj niaj amikoj estas kulpaj pri la fakto, ke Bulteno estas hodiaŭ sendata al pli ol 80 landoj de la mondo kaj ke tiu ĉi nombro ankoraŭ kreskas. En la esperantistaj klubejoj de Leningrad same kiel en tiuj de Montreal, Peking, Hanoi, Rio de Janeiro aŭ Stockholm, ĉie estas nia malgranda Bulteno, por multaj kiel memoro al bela lando kaj feliĉaj renkontoj, por aliaj kiel invitilo konatiĝi pli proksime kun nia nova, de kapitalisma jugo liberigita vivo.

Al tiu ĉi tasko, kiu fariĝas tiel efika en la porpaca batalo de niaj tagoj, servas de nun, dank'al nia kleriga organizo, plej modernaj rimedoj de fotografia preso.

Ne estus realigebla tiu ĉi laboro sen oferemo de kelkaj samideanoj, inter kiuj specialan mencion meritas ano de nia redakcio s-ano Vladimír Pražák. Fakte li kun helpo de s-ino Brotánková, preskaŭ ĉiutage deĵoranta en la Esperanta biblioteko, kreas vizaĝon de "Bulteno", kiu deziras esti ĉiam pli interesa kaj plaĉa, ĉie bonvenigata gasto. jmb

PLENA KUNSIDO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO okazis en Brno /hotelo Slovan/ 4.-5.2.1961. Partoprenis ĝin reprezentantoj de Ministerio por instruado kaj kulturo, de Kleriga instituto de Praha kaj Bratislava kaj de Parko de kulturo kaj ripozo en Brno. Oni pritraktis i. a. proponojn al la konsisto de la nova komitato, SEK kaj SEJ, la kvinjaran eldonplanon, la vojaĝojn eksterlanden, ktp.

ESPERANTISTINOJ DE NIA KLUBO AL LA INTERNACIA VIRINTAGO

La virinoj kunvenintaj la 1-an de marto 1961 en Esperantista Klubo en Praha okaze de granda solena virintago la 8-an de marto, sendis belaspektajn dezirkartojn kun amas-subskriboj al virinoj en Bulgario, USSR, Hungario, Pollando kaj Jugoslavio.

La iniciato ekestinta en la kunvenejo forte entuziasmigis la esperantistinojn aliĝi al la movado de virinoj - pacdefendantinoj /INEVKOM/, por tiel ankoraŭ pli multe helpi la paclaboron.

Petojn pri detalaj informoj sendu al: ČSEK, Blanická 4, Praha 2 - Vinohrady /al kamaradino M. Škodová/.

ESPERANTISTOJ EN PODĚBRADY

Esperantista rondeto ĉe la Domo de kulturo en Poděbrady aranĝis de la 2-a ĝis la 5-a de marto 1961 ekspozicion de infanaj desegnaĵoj el 12 landoj. La ekspozicio estis sukcesa, kio estas videbla el traktado dum solena kunveno, okazinta post finigo de la ekspozicio, kie rezultiĝis ripeti ĝin aliloke.

VIETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO /MEM-sekcio/ sendis al nia klubo jenan leteron:

Hanoi, la 11-an de januaro 1961

Al Estraro de Esperantista Klubo en Praha

Estimataj kaj karaj samideanoj!

Okaze de la venonta 18-a de januaro, datreveno de la Tago kiam frataj popoldemokrataj landoj Oficiale rekonis Vietnaman Demokratian Respublikon, la Centra Komitato de VPEA kaj vietnamaj geesperantistoj sendas al vi kaj al la frata popolo varmajn salutojn kaj dankesprimojn, kun espero, ke la kunlaborado kaj interhelpo inter socialism-landaj esperantistaroj multe plivigliĝu kaj fruktodonu dum la Nova Jaro 1961.

Samideane viaj
Generala sekretario de VPEA
Dao-anh-Kha

BIBLIOTEKO DE LA ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA plivastigas siajn servojn! La librojn oni povos legi aŭ pruntepreni krom vendrede ankaŭ ĉiulunde, de la 16-a ĝis la 18-a horoj. Kvankam niaj kunlaborantoj en diritaj horoj deĵoras en la biblioteko ĉiutage, kaj ankaŭ dum aliaj tagoj priservos vin, ni ne povas provizore certigi regulecon de ĉiutaga servo. - Krom tio la biblioteko anoncas, ke:

- principe ĉiuj libroj estas je dispono de esperantistoj nur en la kadro de biblioteka ejo;
- forporti librojn hejmen rajtas nur membroj de la Klubo, kiuj sin devigas plenorde redoni la librojn tuj post la tralego, kaj ne pli malfrue ol post kvin semajnoj;
- lingvaj verkoj, la lernolibroj, la vortaroj, terminaroj kaj enciklopedioj, manuskriptoj kaj ĉiuj raraj libroj kaj novaj gazetoj estas pruntepreneblaj nur en la bibliotekejo, kaj ne estas permesate forporti ilin hejmen;
- al ĉiu leganto oni permesas kunpreni hejmen nur 1-2 librojn;
- la prunteprenanto promesas ĝustatempe redoni la librojn kaj ne prunti ilin al alia persono.

La biblioteko nombras nun ĉirkaŭ 4500 volumojn. Ĝi situas en Týnská strato n-ro 3, Praha 1.

ESPERANTO INTER TEKNIKISTOJ

En soveta preso vekis nian atenton artikolo de k-do Armand el Moskvo, kiu partoprenis la ekspedicion "kontraŭ erozio" en meza fluo de la rivero Hoang-ho, Ĉinio.

Malgraŭ ĉeesto de bonaj ĉinaj tradukistoj en la ekspedicio, okazis dum la esplorkomando multaj malfacilaĵoj kaj gajaj situacioj. Sed helpis Esperanto. Post tri monatoj k-do Armand tiel perfektigis en la internacia lingvo, ke en Pekino li interkompreniĝis kun japanaj kaj aliaj samfakuloj. "Por ellerni la lingvon de samfakuloj", akcentis k-do Armand, "mi devus dediĉi al la studado duonon de mia vivo."

D-ro I.Havaš

GRAVA ATENTIGO!

Tiu ĉi numero de "Bulteno" estas la lasta, kiun ni sendas al niaj membroj kaj amikoj enlandaj, kiuj dum la tuta jaro ankoraŭ ne sendis almenaŭ minimuman kluban kontribuon /Kĉs 12,-/ por kovri elspezojn por preso kaj liverado de la gazeto.

Ni atentigas, ke de nun la koresponda adreso de EKP estas:

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

fakrondo de Kultura kaj societa centro de ONV-1 Týnská ulice 3, Praha 1 - Staré Město

Th. Dr. ANTONÍN ELTSCHKNER EPISKOPO DE PRAHA


Dum kunvenis vespere, la 22-an de februaro 1961, Esperantista Klubo en Praha, neniu el ni sciis, ke en tiu momento en Brno finbatis nobla koro de tre ŝatata ano de nia granda esperantista familio. Venkita de dolora longedaŭra malsano en 81-a jaro de sia modela kaj modesta vivo, nia esperanta episkopo, lastfoje elspiris.

Kiu mortis en Dr. Antonín Eltschkner?

Titola episkopo de Zefirio. Aktiva episkopo de Praha. La unua prelato kaj preposto de Ĉiam Fidela Metropolitana Kapitulo ĉe S-ta Vito en Praha. Portanto de la Ordeno de la Respubliko. Vickanceliero de teologia fakultato. Oficanta konsistoria konsilanto. Sinoda ekzamenatoro. Ĉefepiskopa komisario de teologia fakultato kaj de mezlernejoj. Eksmembro de Landa lerneja konsilantaro. Roma doktoro de sankta teologio. Honora doktoro de rom-katolika Kirili-Metodia fakultato en Praha kaj Litoměřice. La prezidanto de paca movado de katolika ekleziularo, sed unualoke ĉiam bona, bonkora home fidela adepto de Esperanto, ĝisosta esperantisto,

VERA KARA SAMIDEANO!

Kun Esperanto konatiĝis D-ro Antonio Eltschkner jam kiel pastro. Estis fervoja oficisto Ŝilhart, kiu antaŭ iaj 40 jaroj, en la vagonaro konvertis lin al Esperanto. Sekvis memlernado, kaj post kiam D-ro Eltschkner fariĝis ano de Metropolitana kanonikaro li uzis la okazon de kursoj, kiujn aranĝis Esperantista Klubo en Praha, kaj fariĝis tie la plej diligenta lernanto. Al Esperanto li restis poste fidela dum tuta sia vivo, ĝis lastaj ĝiaj tagoj! Kiam li fariĝis episkopo, li ne forgesis pri la verda stelo al kiu direkte ni iras. Li metis ĝin en sian emblemon, por ĉiam dokumenti sian apartenecon al la esperantista movado. Kiom da samranguloj, sacerdotoj, paroĥestroj kaj pastroj interesiĝis pri tiu ne kutima verda stelo en episkopa blazono. Episkopo Eltschkner bone sciis, ke por Esperanto estas necese ankoraŭ multe labori kaj propagandi. Li sciis, ke devo de ĉiu esperantisto estas praktike uzadi la lingvon dum ĉiu okazo kiu sin prezentas, sed samtempe, ke ne estas eble por Esperanto ne labori kaj ĝin ne propagandi. El tio rezultus fino de tiu plej bela paca ideo - ĉar ne estas ankoraŭ tempo, en kiu Esperanton apud sia gepatra lingvo parolas ĉiuj homoj de ĉiuj popoloj. Post malbona tempo de nacista okupacio li ne bezonis reveni al Esperanto, kiel multaj tion faris, multaj, kiuj timis porti la stelon! Li fiere daŭre portis ĝin, kaj ne forigis ĝin el sia emblemo. Li do ne revenis al la movado, ĉar li neniam forlasis ĝin. Mi ne forgesos liajn konsolajn vortojn, kiujn li dum la mondmilito diris al mi, kiam mi esprimis certajn zorgojn pri estonteco de Esperanto: "Esperanto povas evoluigi nur en tiuj landoj, en kiuj ekzistas libereco! Kredu, ke tiu tempo venos!" Ĝis lastaj tagoj de sia vivo li restis al ni fidela. Ankoraŭ la 6-an de januaro t.j. li petis, ke ni daŭre havigadu al li esperantan legadon. La revuo "Esperanto" /de UEA/kaj gazeto "Heroldo de Esperanto" estis de li atente legataj, malgraŭ okulmalsano, kiu en lastaj jaroj ĉiam pli turmentis lin.



La emblemo de episkopo Eltschkner

Kiom da samranguloj, sacerdotoj, paroĥestroj kaj pastroj interesiĝis pri tiu ne kutima verda stelo en episkopa blazono. Episkopo Eltschkner bone sciis, ke por Esperanto estas necese ankoraŭ multe labori kaj propagandi. Li sciis, ke devo de ĉiu esperantisto estas praktike uzadi la lingvon dum ĉiu okazo kiu sin prezentas, sed samtempe, ke ne estas eble por Esperanto ne labori kaj ĝin ne propagandi. El tio rezultus fino de tiu plej bela paca ideo - ĉar ne estas ankoraŭ tempo, en kiu Esperanton apud sia gepatra lingvo parolas ĉiuj homoj de ĉiuj popoloj. Post malbona tempo de nacista okupacio li ne bezonis reveni al Esperanto, kiel multaj tion faris, multaj, kiuj timis porti la stelon! Li fiere daŭre portis ĝin, kaj ne forigis ĝin el sia emblemo. Li do ne revenis al la movado, ĉar li neniam forlasis ĝin. Mi ne forgesos liajn konsolajn vortojn, kiujn li dum la mondmilito diris al mi, kiam mi esprimis certajn zorgojn pri estonteco de Esperanto: "Esperanto povas evoluigi nur en tiuj landoj, en kiuj ekzistas libereco! Kredu, ke tiu tempo venos!" Ĝis lastaj tagoj de sia vivo li restis al ni fidela. Ankoraŭ la 6-an de januaro t.j. li petis, ke ni daŭre havigadu al li esperantan legadon. La revuo "Esperanto" /de UEA/kaj gazeto "Heroldo de Esperanto" estis de li atente legataj, malgraŭ okulmalsano, kiu en lastaj jaroj ĉiam pli turmentis lin.

Mortintan episkopon oni alportis al Praha, kie la 27-an de februaro en la katedralo de S-ta Vito okazis adiaŭa rekviemo. Ĉeestis multaj ekleziaj, ŝtataj kaj universitataj altranguloj, kaj en la popolamaso aro da esperantistoj. Inter la flordonacoj estis ankaŭ bukedo el blankaj floroj kun verdaj rubandoj, sur kiuj oni legis: "Lastan saluton - Esperantista Klubo en Praha".

Entombigo okazis en la kriptono de Metropolitana kanonikaro en la tombejo de Praha-Břevnov. Esperantaj flagetoj, insignoj kaj floroj falis sur la ĉerkon, post kiam ĝi malsupreniĝis en la kripton...

Laŭ popolaj legendoj, ĉiu nova entombigo la unuan nokton post sia entombigo devas gardestari apud la pordego ĉe la enirejo tombeja. - Nokte inter la 27-a kaj la 28-a de februaro 1961 en la tombaro de S-ta Margarito en Praha-Břevnov deĵoris maljuna esperantisto-episkopo, samideano.

Li ripozu en paco.

Jaroslav Šustr

UNIKA HOMO

Sub tiu ĉi titolo aperis en la revuo Svět sovětů /"La mondo de l'Sovetoj", Praha, n-ro 2/1961/ novelo de Maxim Gorkij. La fama sovetia verkisto rakontas en ĝi pri elstara persono de la jakuta nacio, Alexej Semjonov, kiu fariĝis lia amiko:

"Semjonov rakontis pri si, ke li estas orfo, li vivis, se mi bone memoras, en Trojicko-Savsko kiel metilernanto. En sia libera tempo li, "pro enuo"ekstudis Esperanton, sed ellerninte ĝin li ekdubis, ĉu iu parolas tiun lingvon. La duboj estas instruaj, kiu ne dubas, neniam konvinkiĝas. Alexej Semjonov konvinkigis, ke Esperanto ekzistas, laŭ maniero tra originala: Li ofertis al londona ĉasaj-komerca firmo liveradon de frostkonservitaj tetraoj, per telegramo en Esperanto. Li posedis, kompreneble, neniun tetreon, sed la angloj respondis al li ankaŭ en Esperanto, kio signifis, ke tiu ĉi lingvo ekzistas kaj ke oni povas helpe de ĝi vojaĝi tra Eŭropo.

Armita sole per Esperanto kaj per kelkaj traigitaj libroj pri la kultur-historio, li traveturis kun sia edzino, ĉiujn iom gravajn urbojn de la okcidenta Eŭropo, vizitis ĉiujn muzeojn, rigardis vicon da industriaj entreprenoj ..." ktp., /Postnoto:La historieto okazis antaŭ la unua mondmilito./

-jm

"INTERHELPO"

La gvidantaro de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio en Moskvo interrilatis dum la milito kun ĉeĥaj kaj slovakaj kunlaborantoj de la kooperativo "Reflektor", kiu alveturis Sovetunion en la jaro 1924 por labori tie, kaj kies multaj membroj devenis el la regiono de Kladno. En la kooperativo "Reflektor" apud Seratov provizore dumilite kiel forĝisto laboris kamarado Josef Kolský, kiam li, post la atako je Sovetunio fare de hitlera Germanio en la jaro 1941, devis kiel politika elmigrinto migradi de Lvov al pli malantaŭaj partoj de USSR.

La dua ĉeĥoslovaka kooperativo estis "Interhelpo", k^u elektis tiun ci nomon en Esperanto, ĉar Esperanto tiam en la internacia laborista movado estis favorata. En la kooperativo estis ĉeĥaj kaj precipe slovakaj kaj hungaraj kamaradoj el Slovakio. La kooperativo "Interhelpo" elektis en la jaro 1925 sian laborlokon en Kirgizio apud la urbo Frunze, kie ĝi plenumis signifan kaj meritplenan konstruverkon, hodiaŭ danke kaj alte taksatan flanke de sovetaj kamaradoj. La kooperativo "Interhelpo" estis vizitata antaŭ la milito de delegacioj, en kiuj partoprenis kamaradoj Zápotocký kaj Harus, poste kamaradoj Petr Jilemnický, Eduard Urx kaj Julius Fučík. El konataj laborantoj de "Interhelpo" mi nomas kamaradon Alois Málek, ilian estintan ministron de malpeza industrio, kamaradon František Bedřich, kiu post la milito laboris en la administrejo de nia radio, kaj fine kamaradon Szaco, kiu post la milito fariĝis ministro de komunuma mastrumado en Hungara popola respubliko kaj en "Interhelpo" sin nomis Samuel. Estas ankoraŭ menciinde, ke filoj de laborantoj de la kooperativo "Interhelpo" estas k-do Josef Reitmajer, hodiaŭ ministro de peza industrio kaj k-do Alexandr Dubček, hodiaŭ ĉefo de la sekretariejo de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio en la regiono Bratislava.

Václav Kopecký: "ČSR a KSČ" /Subtitolo: "Memoraj elkriboj al la historio de ČSR kaj la batalo de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio por la socialisme Ĉeĥoslovakio"./
Ŝtata eldonejo de politika literaturo. Praha 1960, pago 305-306.

S-ANO KEI KURISU PRELEGIS EN PLZEŇ

En novembro 1960 okazis en Plzeň du prelegoj de s-ano Kei Kurisu el Tokio "Japanujo hieraŭ kaj hodiaŭ". Tuj komence estas necese diri, ke ambaŭ prelegoj estis tre sukcesaj. La publiko ekinteresiĝis ne nur pri Japanujo, pri s-ano Kurisu kaj liaj tradukoj de kelkaj ĉeĥaj verkoj, sed ankaŭ pri Esperanto /s-ano Kurisu prelegis en Esperanto kun ĉeĥa traduko fare de s-ano Váňa/ - kelkaj demandis, kie kaj kiam okazas kunvenoj de esperantistoj, ĉu estas organizataj kursoj ktp.

Dank' al klopodoj de samideanoj el Plzeň, la vizito de s-ano Kurisu multe helpis al propagando de Esperanto en la urbo. Aperis afiŝetoj pri tiuj prelegoj, pri s-ano Kurisu kaj pri Esperanto parolis la regiona radiostacio. Krom vizito de kelkaj muzeoj kaj memorindaĵoj de la urbo, la ŝatata gasto ekskursis en "ZVIL" /antaŭaj Ŝkoda uzinoj/ kaj en bierfarejo "Prazdroj"; ĉie li estis bonvenigata kaj pridonacita de ĉefoj. La sekvantan tagon okazis solena akcepto kaj regalo de samideano Kurisu fare de la prezidanto de urba nacia komitato, kamarado Rada, kaj fare de sekretario de ĉi tiu komitato. La urba nacia komitato disponigis al s-ano Kurisu aŭtomobilon, en kiu li traveturis multajn kvartalojn de la urbo.

Kelkaj eble povus al ni diri, ke ni ne prizorgis ian amuzon por nia gasto, ke ni devigis lin nur prelegi, agrable rideti, respondi la demandojn ktp. Tiujn homojn - se tiaj ekzistas - mi volus konvinki, ke li pasigis ankaŭ gajan vesperon inter la amikoj.

Vlad. Váňa

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO FONDITA!

La hungara kulturministro distingis per ordeno "Por laboro por la socialisma kulturo" gesanojn Julio Baghy, d-ro Kolomano Kalocsay kaj Mária Kenesei. Dum la organiza kunveno oni decidis transformi la gisnunan Hungaran Esperanto-Konsilantaron al hungara Esperanto-Asocio /adreso: Poŝtfako 147, Budapeŝto 4/. Oni preparas eldonadon de kvaronjara ilustrita revuo kaj noveladon de Esperanta-Hungara Vortaro ĉe la akademio. La nova lernolibro de Julio Baghy aperis ĉe Ŝtata Eldonejo en dua eldono /5500 ekz./.

ANKORAŬ UNU SUKCESO DE ESPERANTO EN SOVETIO

La 17-an de decembro 1960 okazis sukcesa inaŭguro de Esperantista Klubo ĉe Kulturpalaco de studentoj en la ukraina urbo Dnëpropetrovsk. Dum la inaŭguro oni omaĝis ankaŭ la 101-an datrevenon de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof. Studentino V. Kornelina raportis je la temo "Zamenhof - la kreinto de l'intemacia lingvo Esperanto".

Grandan interesoj vekis ankaŭ la legado de speciala ĉapitro "Estonto apartenas al Esperanto" el la verko de k-do J. S. Ŝkapa, el lia libro "Rememoroj pri kunlaborado kun A. M. Gorkij", kies multaj eldiroj pri la lingvo Esperanto kaj pri d-ro Zamenhof estis ĉiam tre favoraj kaj plenlaŭdaj.

Post la inaŭguro kelkaj novaj esperantistoj debutis, deklamante tradukojn el Puŝkin k.a.

La inaŭguron kaj ĉiujn aranĝojn ĉeestis pli ol 500 personoj. Al ĉiuj ĉeestintoj estis donacita speciale presita ruslingva folio pri Esperanto.

Samtempe estis aranĝita ekspozicio de esperantajj, seninterrompe sieĝata de la interesiĝantoj.

Dum la unua kunsido de la klubanoj estis elektita la estraro: gvidanto F. Vasilenko /studento-medicinisto/, vicgvidanto V. Pimenov /pensiulo, malnova esperantisto-veterano de l'jaro 1908/ sekretario Smolnjakov /studento-medicinisto/.

Estas organizataj kelkaj kursoj en la ejo de la Kulturpalaco. La pli frue organizataj kursoj sufiĉe bone prosperas; la kursojn gvidas: V. Koloĉkov en mezlernejo por 20 gelernantoj, V. Pimenov en medicina instituto por 15 gestudentoj, E. Ĵuravskij en „radiocentro por 10 gelaborantoj, P.Cerniskov en altlernejo por 20 gestudentoj, F. Vasilenko en hospitalo por 10 gekuracistoj kaj E. Ĵuravskij en teatra lernejo por 10 gelernantoj.

Nun la nova Esperantista Klubo bezonas por konstanta ekspozicio ĉiuspecajn esperantajn / librojn ,gazetojn, leterojn, PK k.al./, kaj danke rekompencos per il. PK afrankitaj per novemisiitaj sovetaĵaj PM. Bonvolu ĉion adresi al: Esperantista Klubo ĉe Kulturpalaco de studentoj, Dnepropetrovsk 27, USSR. V. Pimenov

EL PRAHA NI SALUTAS VIN ELKORE

JULIO BAGHY, homo homa,

homecon serĉas malespere
kaj luktas arde kaj kolere
kun la milito sango-voma.

En nokto de Malam' fantoma
la koron portas li fajrere,
JULIO BAGHY, homo homa,
homecon serĉas malespere,

Pri ĉio misa, falsa, gnoma
indignas li profet-severe.
Sed ofta ridas ni sincere,
se ĉarmas nin per ŝerc' aroma

JULIO BAGHY, homo homa.

/K.Kalocsay, Rimportretoj/



Tre baldaŭ post mia esperantiĝo kaj post la unuaj provoj verki originalajn esperantajn kantaĵojn mi havis la okazon legi kelkajn poemojn de Julio Baghy. La versoj iel vokis pri melodio kaj vekis la scivolon pri la tuta poemaro, la fame konata "Vagabondo kantas". Sen troa cerbumado mi trovis la adreson de l' aŭtoro, kaj iom abrupte petis de li la delonge jam nericeveblan libreton /ne tre kredante pri la sukceso/. Sed kia surprizo! Baghy ne nur sendis la "Vagabondon", sed aldonis eĉ personan dediĉon.

Dum komponado de la versoj disvolviĝis amika koresponaado, por mi tre valoras "Paĉjo" tiel oni titolas Julio Baghy - naĝas en la movado kiel fiŝo jam de ĝia komenco, Paĉjo ĉeestis preskaŭ ĉiujn kongresojn, Paĉjo konas persone ĉiujn matadorojn de la movado, kaj ĉefe: Paĉjo scias pri ĉio ĉi raporti tre sugeste kaj simpatie, foje nesupereble humorece. Kaj la plej valora parto de nia korespondado estis, kiam Paĉjo malfermis la pordon de sia propra uzino verkista; ne ĉiu aŭtoro kapablas tiel agi. La sekvo de la Paĉja bonvolo estis, ke mi komencis mem verki.

Kompreneble mi ĉiam deziris kontakti Paĉjon persone, sed oni povis apenaŭ kredi, ke ĝi foje efektiviĝos. Kia ĝojiga komuniko, kiam Paĉjo anoncis la halton en Prago! Kun streĉo mi atendis la tagon de la vid-al-vido...

La 16-an de julio /1956/, je la kvina horo matene atendis Paĉjon eta grupo de klubanoj sur fervojperono.

Venis la ekspreso kaj mi ĝoje salutis la verdan flageton flagrantan el fenestro; kaj sekvis tumulto, ĉirkaŭbrakumado, eĉ larmoj de ĝojo. Paĉjo estis mem inter ni! Jen homo, kiu portas en sia koro tiom da amo; homo, kiun oni devas ami ... Neniam mi vidis similan; la personeco de Julio Baghy estas io eksterordinara, eble eĉ ununura, jes - nunura.

Paco Baghy 70-jara? Kiel, tiu juneca koro portas sepdek, jam sep dekojn? Ne, ne ..., tiu simpatia homo kaj tiu profunda sento, tiu amo sen mezuro kaj oferemo sen halto restos por ĉiam juna, malgraŭ ĉiaj kalkuloj.

Ŝtefo Urban

INTERVJUO

kun samideanino JULIE ŠUPICHOVÁ, kiu atingis 77 jarojn de sia vivo. Al tiu ĉi jubileo vizitis sin vicprezidanto de nia Klubo A. Slanina.

Vi naskiĝis la 27-an de januaro 1884 en Studnice apud Česká Skalice, do hodiaŭ vi ĝisvivas 77 jarojn. Kiel vi sentas vin?

Ne tre bone, depost jaro 1954 mia sanstato daŭre malboniĝas. Tio malebligas al mi labori publike por Esperanto.

Kiam vi fariĝis instruistino?

La sopiratan diplomon de instruistino al ricevis en jaro 1907. Mi instruis en Červený Kostelec, Hronov nad Metují kaj de la jaro 1910 en Praha.

Esperantistino vi fariĝis en la jaro 1907, ĉu vi povas diri kiel kaj kial?

Vi estas bone informita. Jam kiel studentino mi interesiĝis pri la problemoj de internacia lingvo. Fakte pri Esperanto atentigis min la semajna gazeto Národní obzor, kie aperis kelkaj lecionoj de Esperanta kurso. Poste mi havigis al mi lernolibron de Th. Čejka kaj J. Krumpholtz. Kial mi lernis? La ĉefa motivo de mia esperantistiĝo estis deziro disvastigi la ideon de paco inter la homaro kaj Esperanto ŝajnis al mi la plej taŭga kaj facila interkomprenilo.



Vi fondis Esperanto-societojn. Mi petas, nomu al mi kiujn kaj iliajn celojn.

En Červený Kostelec mi komencis instrui Esperanton kaj fondis Esperantan Unuiĝon. Veninte al Praha, mi fariĝis sekretario de Virina grupo esperantista. Dum unua mondmilito la Grupo disiĝis. Miaj novaj kursaninoj kunvenadis en mia hejmo. En jaro 1919 mi fondis Rondeton de esperantistinoj, kiu estis la unua lege aprobita Esperanta societo en nova Respubliko. Ĝia celo estis fari propagandon kaj helpi al ĈAE. Dum la 13-a UK en Praha 1921 mi helpis kiel sekretario al LLK. Dum la kongreso mi prezidia kunvenon de instruistoj. En la jaro 1922 kiel delegitino de la nomita Rondeto mi partoprenis konferencon de instruistoj en Genève kiu kunvokis Pedagogia instituto de J. J. Rousseau. Tie mi parolis pri morala signifo de Esperanto por la junularo. Venontan jaron mi gvidis fakan kunvenon de virinoj dum UK en Nürnberg.

Via propaganda laboro por Esperanto estas granda. Mi petas, diru al mi ĉefajn trajtojn de tiu ĉi laboro.

Mia ĉefa klopodo estis interesigi diversajn tavolojn pri utilo de Esperanto, precipe per artikoloj en gazetoj kaj fakaj revuoj. Oni riproĉis al mi nesufiĉan kunlaboron kun progresemaj gazetoj. Mi volis kaj penis kunlabori, sed la sinteno de kelkaj gazetoj ne ĉiam estis favora. Dume en Sovetio estis eldonataj Esp-gazetoj, libroj, poŝtmarkoj ktp. Krom tagaj gazetoj, kie aperadis mia Esperanta kroniko, mi kun plezuro skribis kursojn en diversaj porjunulaj gazetoj, ekzemple en Malý čtenář, kie mia Esperanto-anguleto /gramatiko kaj novaĵoj el la movado/ interesiĝis dum 8 jaroj ne nur infanojn, sed ankaŭ plenaĝulojn. Dum mia vivo mi skribis nekalkuleblan nombron da artikoloj, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri altaj temoj. Mi gvidis multajn kursojn kaj ofte paroladis, ankaŭ en radio. Mia dumviva sopiro estis

instrui Esperanton en lernejoj. Sur tiu kampo bedaŭrinde mi sukcesis nur unufojon, en jaro 1922, ĉar mi estis pro malsano tre frue pensiita.

Bonvolu diri ion pri viaj publikaĵoj, inter kiuj lernolibroj fariĝis mondfamaj.

Unua lernolibro por memlernantoj atingis 5 eldonojn. Du lernolibroj por infanoj estis eldonitaj en Nymburk. Krome aperis "Esperanto-korespondanto" granda eldono. Ĝi helpas al tiuj, kiuj post la kurso volas korespondi. "Juna korespondanto" aperadis en nia gazeto "Esperantista". Pli ampleksa ĝi estis eldonita kiel broŝureto de Pola Esperanto-Asocio en Varsovio. Per mia legolibro "Legu kaj parolu" mi volis doni al la progresintoj materialon por ekzerco, kaj mia ĉefa biografio "Kiu estas L. L. Zamenhof" volas konatigi la kreinton de Esperanto al nia publiko. Centojn da kartoj kaj leteroj mi ricevadis kun peto pri informo. Tio instigis min kunmeti broŝuron /ĉeĥan/ "Ĉu vi interesiĝas pri Esperanto?", kiu enhavis 150 demandojn kaj 150 respondojn, kiuj informis detale pri ĉio, kio rilatas Esperanton, ĝian evoluon, literaturon, organizojn, gazetojn ktp. En jaro 1957 aperis en Zagreb de mi verkita "Ni legas kaj lernas". Entute aperis de post 1917 ĝis 1958 miaj 22 verkoj pri kaj en Esperanto, krome ankaŭ 4 ĉeĥaj verkoj de kleriga tendenco.

Vi mem eldonadis gazeton "Esperantský zpravodaj" en jaroj 1920-1925. En kiu eldonkvanto?

Jes, en tiu tempo mi kuraĝis tute sola eldonadi ĉeĥan gazeton, kies celo estis vekii intereson pri Esperanto. Ĝia eldonkvanto komence estis du mil. Kompreneble tio estis tute malprofitdona entrepreno, bedaŭrinde, ke niaj samideanoj ne sufiĉe subtenis mian ideon. Vi ja scias, kiel multekosta afero estas presa eldonado.

La samon ni havas kun nia "Bulteno". Presita vorto estas ja nia ĉefa ekzercilo kaj multaj sami deanoj "ŝparas", nepagante la kotizon. Kion vi diras pri nia "Bulteno"?

"Bulteno" aperas bedaŭrinde malofte. La ĈEK zorgu pei eldonado de presita gazeto. Sed mi scias, ke la laboro ne estas facila.

Kion vi diras al nuna Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio?

La Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio nun post la starigo de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato havas ŝancon pli bone kaj oportune labori.

Ĉu mi povas peti vian opinion pri modernaj fluoj en Esperanta-lingvo, speciale rilatante al neologismoj?

Esperanto, kiel ĉiu lingvo, devas evoluigi, sed ĝia evoluo estu en limoj de la Fundamento. Esperanto estas dua lingvo por ni, ĝi devas esti facile komprenebla, alie ni perdos la eblon argumenti, ke Esperanto taŭgas por ĉiu homo.

Kion vi volas diri al nia junularo?

Fervora laboro de nia junularo ĝojigas min. Junularo estas nia estonteco. Esperanto bezonas freŝajn fortojn. En nuna epoko oni devas ne nur labori por Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto al nobla celo de la tutmonda paco.


En via aĝo vi estas vigla, /Esperanto ja junigas/. Kiaj estas viaj planoj?

La planoj? Ĉar mia vivovojo jam tre mallongigas, estas lasta verketo, kiun mi nomis "Samideana spegulo", kvazaŭ mia testamento. Parto de ĝi jam aperis en La Praktiko 10/1960. Tie mi meditas pri aferoj koncernantaj la esperantistojn. Danke mi rememoras la genian kreinton de Esperanto, de la lingvo, kiu heligas miajn tagojn en ĉiu tempo kaj provizas

mian koron, precipe nun en mia izoliteco, per nova forto. Mi restos fidela al nia kara Esperanto ĝis mia lasta spiro.

Josef Trojan:

MUZIKFESTIVALO "PRINTEMPO EN PRAHA"



La vilao "Bertramka", restadejo de Mozart en Praha

En Praha, ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, la printempo posedas ĉarman de abrupte vekiganta naturo, kiam ĉiuj deklivoj, ĉirkaŭantaj lago-larĝan riveron Vltava, subite disfloras agrabla-odore. Tiam la urbo plej multe logĉarmas.

Kaj eble tial jam dum 700 jaroj en pacperiodoj la muzikistoj el malproksimaj regionoj venas por meze de floroj ĉe la senteme perceptanta aŭskultantaro plantadi ideon tiom feliĉe evoluantan en lastaj jaroj: Per la musiko al paca kunlaboro de nacioj! Kaj ĉar ĉeĥoslovakaj artistoj majstras siaĉarton, firme starante je multcentjara muziktradicio, la internacia muzikfestivalo "Printempo en Praha" eĥiĝas la mondon alvokante belartistojn el proksimo samkiel el malprokamo.

En junio jare 1297 Praha estis jam famekonata urbo kun altfrontonaj domoj, bonstataj monaĥejoj, preĝejoj kaj sinagogo. Inter butikoj de multekosta varo kaj sur la ĉefplaco, tiam unuafoje paviminta, vagpromenis buntkoloraj vestitaj junuloj kun liutoj, sakfajfiloj, violonoj, flutoj; riĉaj kaj malriĉaj amuzis mecenojn - la reĝon, nobelaron kaj patriciojn - kaj

plezuris eĉ malriĉuloj, almenaŭ de malproksimo. Tiam ja feste reĝkronita estis Venceslao la II-a, konata "minesengro", kiu al la solenaĵo invitis kantistojn kaj poetojn, por ke ili, kune kun ludoj kaj turniroj, ĝojigu la urbon; tiamaniere li metis fundamenton al estonte regule okazantaj printempfestoj. La tuta maskirado akvo-speguligis en la rivero Vltava, kiu tiam unuafoje ŝvelondiĝis antaŭ la kluzoj ĵus konstruitaj.

En regtempo de Johano de Lucemburgio Pragon vizitis franco Guillaume Machaut, la plej elstara reprezentanto de "ars nova" /nova arto/, ravita per alta nivelo de ĉeĥa muziko. Per muziko laika kaj preĝeja, unisona kaj polifona resonadis plene pli poste la Praha de pintarkoj, gotika urbo de Karolo la IV-a, en kiu malaperis iama, ankoraŭ vilaĝa karaktero - precipe sur granda areo orienten. Sur giganta konstru-spaco abrupte leviĝadis turpintoj de novaj preĝejoj kaj vastampleksaj konstruaĵoj de novaj monaĥejoj, sur maldekstra bordo komencis konturiĝi la hodiaŭa panoramo de Hradĉany-kastelo, super la rivero Vltava volbiĝis la Ŝtona ponto kaj sur Petřín-monto streĉiĝis helnova muregzono de "Malsato". De ĉie aŭdiĝis muziko, ĉar Karolo la IV-a volonte subtenadis la belarton. En preĝejoj daŭre funkciadis kant- kaj instrumenthoroj, kaj la popolo povis amuziĝi ĉe paskfestaj dramoj kaj farsoj. La tradicio de ĉeĥa popolkanto plene eksonis en la kantoj de Hus-anoj. Smetana kaj Dvořák ĉerpis multan impulson el tiu ĉi tradicio.

Gotika melodio revenis nur sub reĝo Georgo /1448-1471/ kaj dum regado de du liaj tronsekvantoj. La urbo ornamigis per novaj muregoj kaj pordegoj super Týn-katedralo leviĝis du majestaj turoj, sur transrivera flanko de la Ŝtona ponto estis konstruita nova pontoturo, en Malnovurba murego la Pulvo-turo, multo alia estis rekonstruita kaj la urbon eĥigis la muziko de nova festado.

Pli ofte ol italoj en 16-a jarcento aperas nederlandanoj kun komplika polifonio renesanca. Grandaj horoj forlasas la altaron kaj supreniras novajn muzikhorejojn, Eĉ la katedralo de s-ta Vito kun brila renesancorgeno fariĝas koncert-aŭlo. Krom la muzikistaro de imperiestro prezentiĝas kapeloj urbaj, kapeloj de diversaj delegitaroj, eĉ juda kapelo de Praha. Dek lignaj instrumentoj en la muziksekcio de Nacia muzeo prezentas unikan kolektaĵon renesanc-tipan. Praha, post la brul-ruiniĝo de kastelo Hradčany kaj ĝia suburbo jare 1541, transformiĝadis renesancurbej: estis rekonstruitaj fortifikajo, preĝejoj, lernejoj; kun novaj tegmentoj la katedralo de s-ta Vito, ĝiaj grandaj turoj kaj la kastelo de Vladislao. La muziko resonas en novaj palacoj de nobelaro kaj patricioj, samkiel en la ĵus fondiĝinta subkastela "Nova mondo" kaj en la tipe "itala" strateto.

Baroko kunpremis la urbon en fortikaĵa zono kaj homojn en premuniformon de katolika kontr aŭreformacio. Nova parvenua nobelaro kaj eklezio konstruadis siajn rezidencojn-kastelojn.

Estas konstruataj tujaj urboplacoj - superurbe leviĝas preĝejkupoloj, sur la Ŝtona ponto kreskas l'aleo da tridek statuaroj kaj la Hradčany-piedon ornamas ĉarmaj ĝardenoj. En la politika subpremo la popolo eblis manifestiĝi nur per muziko. Tamen tiu ĉi epoko luksoplana produktis eminentajn belartistojn. Estiĝis memstara arto de festado, en teatroj sonis vorto parolata kaj kantata; la nobelaro, ekleziuloj, ambasadejoj vetarancis koncertojn. La muziko hejmis en palacoj, preĝejoj kaj printempe-somere en multaj ĝardenoj. Aŭdantaro desur la Ŝtona ponto kaj desur bordoj rigardadis riveron Vltava, kie ŝipveturis koncertantaj ĥoroj.

En Praha eventis la plej glorfamaj prezentadoj en la historio de l'opero, ekestis Muzikakademio, eminentiĝis novaj muzik-komponistoj kaj al la printempfestoj kunveturadis belartistoj el fremdlandoj la hejmlandanoj ĉi tien piediradis el tuta Bohemio.

Ĉeĥoj tutkomprenis la muzikon, en ĉiu vilaĝo ĝin zorgis kantoro-instruisto. Ne hazarde en Praha oni tuj kompren-aprezis la genion de Mozart. La popolo per muziko revekiĝis al nova vivo. Ĉiam la muzik-tonoj printempe sonadis el ĝardenoj, parkoj, insuloj kaj eĉ desur Vltavarivero.

Fremdlando en la 18-a jarcento nomis ĉeĥion la "konservatorio de Eŭropo". Ĉi tiun karakteristikon meritalportis multaj generacioj de ĉeĥaj muzikistoj. En tiu epoko ankaŭ radikas la ĉeĥa muzikkreado en 19-a jarcento, tiu de Bedřich Smetana, Antonín Dvořák, de ilia sekvantaro kaj precipe de Leoš Janáček.

Kaj tial la decidiĝo de Ĉeĥa filharmonio, en jaro 1946 memorfesti 50 jarojn de sia aktiveco per belartista manifesto, estis akompanata per granda respondeco al riĉa tradicio de festoj similaj. La "Printempa muzik-festivalo de Praha" sukcesis sub la devizo "Per muziko al paca kunlaboro de nacioj",

En Eŭropo ĉiujare estas aranĝataj minimume 50 muzik- kaj kantfestivaloj, sed la "Printempo de Praha" tamen elstaras pro mondamplekseco, per la internaciaj konkursoj de junaj interpretistoj-artistoj, kaj pro ekspertiza konceptado de l'aŭskultantoj. Ne estas ignorebla fakto, ke la "Printempo de Praha" nun jam fariĝis tutnacia, popola kulturevento, per disaŭdiĝo kaj televido impresanta la muzikvicon kaj inicianta pluajn muzikeventojn en Ĉeĥoslovakio.

Laŭ decido en jaro 1952 ĉiujare la 12-an de majo la festivalo estas inaŭgurita per la simfonia ciklo "Mia patrujo" de Smetana, laŭeble fermita per la "Naŭa" simfonio de Beethoven.

Kaj tiel la siatempa "Praha de Mozart" sencese muziksonas, nun eĉ tra la tuta mondo. Iam ĝin aŭskultadis la regantoj, hodiaŭ ĝi apartenas al ĉiuj.

Esperantigis J. Cíhová

EL LA GAZETARO

18 SCIENCAJ VERKOJ KAJ RESUMOJ EN ESPERANTO. En la bibliografio de sciencaj verkoj de profesoro d-ro B.Popovič troviĝas 29 verkoj. El tiuj 13 estas verkitaj plene de Esperanto kaj 5 havas resumon en Esperanto. Ni memorigas, ke resumoj en Esperanto aperigis ĝis nun en Jugoslavio en siaj verkoj ankaŭ Lic. Marinko Gjivoje /en fakoj: arkeologio, bibliografio, historio, speciologio/ kaj profesoro d-ro Oton Pancer /en fako: agronomio/.

Laŭ CED /Centro de Esploro kaj Dokumentado/ oni instruis en jaroj 1959 ĝis 1960 Esperanton en 340 lernejoj de 27 landoj entute kun 13 009 gelernantoj.

LA RETO DE UEA - DELEGITOJ EN SOVETUNIO plivastiĝas. En revuo "Esperanto" oni donas adresojn de pliaj delegitoj en Moskvo, Kiev, Kovno, Tallin kaj Tula. UEA - delegitojn oni povas trovi tra la tuta Sovetunio.

EN FEBRUARA N-RO DE "ESPERANTO-REVUO" estas artikolo "Unesko-Konferenco sub la signo de Afriko". El ĝi ni eltiras la dirojn de afrikaj delegitoj pri Esperanto. S-ro Aja Nwaĉuhuku M. P. federacia edukministro de Nigerio diris: "Esperanto estas lingvo neŭtrala kaj pro tio dezirinda. Se ĝi ankaŭ estas facila kaj tiel riĉa, kiel la aliaj grandaj lingvoj, ni ne vidas obstaklon por ĝia internacia adopto. Oni devus instrui ĝin en ĉiuj universitatoj tiel, ke la kleruloj de la tuta mondo havu facilan aliron al ĝi."

S-ro Ali Gerad Jama, edukministro de Somalio, diris: "Granda parto de internaciaj malfacilaĵoj estas kaŭzita de miskomprenoj inter diverslandaj homoj. Tial mi kredas, ke Esperanto kiel Instrumento de tuthoma interkompreniĝado povus grandskale kontribui al la reciproka alproksimiĝo de la popoloj. Ĝi estas respondo al granda bezono, kiun hodiaŭ la tuta mondo sentas. Ni apartenantoj al malgrandaj nacioj, estas devigataj lerni la lingvojn de la grandaj, se ni volas partopreni la vivon kaj la progreson de la mondo kaj havi rilatojn politikajn, sciencajn, komercajn kaj kulturajn. Tio estas humiliga par la malgrandaj nacioj. Nur neutrala lingvo kiel Esperanto povos elimini kulturan dependecon."

EL "HEROLDO" En Beirut, la ĉefurbo de Libano fondiĝis libana Esperanto-Asocio.

En urbo Szeged, Hungarlando, estas fondita la Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko. Ĝi havas gravan rolon: dokumenti ĉefe por eksteruloj, ke ekzistas popolo, kiu uzas internacian lingvon, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kiu posedas riĉan literaturon kaj tradicion. -., Oni aldonas: ni forte kredas, ke ankaŭ vi, kara leganto, komprenas la signifon de nia nova institucio kaj se vi povas, certe volonte apogos ĝin per libro- kaj gazetdonacoj. La adreso: Hungarlanda Esperanto-Biblioteko, Szeged, p.k. 441, Hungarujo. H.Ŝ.

D-ro STANISLAV KAMARÝT MEMUAROJ EL NIA ESPERANTO-MOVADO (FRAGMENTO)

Antaŭ fino de la pasinta jaro ni sukcesis havigi tre valoran manuskripton. Estas fragmento de plej malnova historio de la Esperanto-movado en nia lando, kiun laŭ sia propra sperto skribis nia neforgesebla membro, d-ro Kamarýt; afable donacis ĝin al ni lia edzino. Tiu verkaĵo estas tiom grava kaj interesa, ke ni decidis publikigi ĝin kiel daŭrigo en BULTENO, ĉar tiamaniere konatiĝos kun ĝi ĉiuj niaj membroj kaj amikoj, eĉ en la vasta mondo. Cetere ni nuntempe ne havas alian pli taŭgan eblecon de publikigo. Do ni prezentas al la legantaro la

inaŭguran parton de tiu ĉi valorega serio de ekskursoj al la plej malnova, entuziasma epoko de nia movado, esprimante tiel omaĝon al la verkinto kaj sinceran dankon al lia familio.

Esperantisto mi fariĝis en 1900 en sepa klaso gimnazia. Okazis tio hazarde. Presisto Fr. Hoblík en Pardubice ofertadis al studentoj sortimentojn de malnovaj libroj, nevendeblaj jam je normala prezo. Mi aĉetis unu el tiaj paketoj, malkaran. Inter diversaj libroj /ekz. Ueber Wiederbelebung der Knochenkohle/ enestis broŝuro de Fr. VI. Lorenz: Lernolibro de Lingvo Internacia de D-ro Esperanto. La unua pioniro de Esperanto verkis ĝin laŭ la Unua Libro kaj eldonis ĝin en 1890. Do la trian jaron post apero de la Unua Libro. Ĝi estis verkita laŭ Zamenhofa modelo, en bona ĉeĥa lingvo, enhavis el la poemoj "Ho mia kor" kaj tradukon de ĉeĥa nacia himno "Ho mia hejm" /la aŭtoro anstataŭ supersignoj uzis h-zeŭgmojn/. La broŝuro konvinkis min, la ideo min kaptis, mi lernis ĉion el la broŝuro lerneblan kaj rigardis min esperantisto. Laŭ tiu ĉi sperto persona mi kredas, ke mallonga libreto estas pli efika por varbaj celoj ol libro dika. La broŝuron mi longe konservadis. Dum disputo pri forigo de supersignoj mi sendis ĝin al UEA, kie ĝi restis en tiea biblioteko.

Francisko Vladimiro Lorenz naskiĝis 24.12.1872 en Zbyslav apud Čáslav. Li estis el laboristaj gepatroj. Studis gimnazion, el la oka klaso li ekŝiĝis pro malsano kaj vivtenis sin kiel kunlaboranto en Praha en socialdemokrataj gazetoj kaj instruante private. La Esperanto-lernolibron li verkis 18-jara. Ĝi titolis "Úplná učebnice mezinárodní řeči Dra Esperanta." Napsal Fr. VI.L. Plena lernolibro de lingvo internacia de D-ro Esperanto. Pro Bohemoj verkis Fr.VI. L. v Pardubicích. Tiskem firmy F. Hoblík. Nákladem vlastním 1890, 27 paĝoj 12x19 cm".

En Praha li vivis tri jarojn, poste li fuĝis Brazilon, ĉar li estis suspektata de polico pro konspira agado inter socialistoj, verŝajne pro kontaktoj kun akuzitoj en tiama Omladina-proceso. En Brazilo li travivis penajn jarojn de ekzilito, laboris en orminejo, ĉe masonistoj, kiel ĉipa ŝarĝo - portisto, viandsekiĝisto en vendejo de seka viando, taglaboristo terkulturista, privata instruisto, poŝtagento. En 1899 /jam edziĝinta/ li ricevis en Porto Alegre, la ĉefurbo de la ŝtato Rio Grande do Sul, postenon de kontrolisto kaj tradukisto ĉe administro de enmigrado. Tiam li faris sukcese ekzamenojn pri scio de 12 lingvoj. Sed tiun postenon li forlasis post ses monatoj, ĉar li sentis sin minacata de ftizo, kaj transloĝiĝis ree en kamparon en vilaĝon Dom Feliciano, kie li loĝas ĝis nun. En 1903 li estis nomita ŝtata instruisto. Li verkadis precipe en filologia afero, multon publikigis portugallingve, en 1943 iĝis pensiulo. Li fariĝis fama poligloto. Restis daŭre aktiva en movado por internacia lingvo. Oni eldonis 16 liajn originalajn librojn, inter kiuj la plej grava estas impona volumo „Iniciacao Linguística“ /lingvistika Iniciado/ el 1929, tre ŝatata verko kaj ĉirkaŭ 200 poemojn kaj poemetojn el 44 lingvoj.

Ankaŭ detala Esperanto-lernolibro por portugaloj aperis el lia plumo. „Sed mono ĉiam evitis min“, diris tiu viro spertinta vivon longan kaj ekster serio en unu letero skribita al ni en 1948. Dum sia restado en Praha Lorenz ankaŭ provis propagandi Esperanton instruante ĝin en medio de kunvenoj de tiamaj socialdemokratoj. Sed tiu lia klopodado havis malgrandan resonon kaj restis sen rezultoj konstateblaj. Estas al ni konata unusola esperantistino, kiu restis el tiamaj tempoj.

Běla Reichlová, ankaŭ homo de nekutimaj sortoj, fosinta sulkon profundan dum vivo kun aventuroj ekskluzive spiritaĵaj, ŝia knabina nomo estis Krapková, ŝia kuzo J. Krapka estis inter unuaj disvastigantoj de socialismaj ideoj en nia lando. /Daŭrigo en la venonta numero/.

"BŪRKA- NA ACONCAGUI"

/"Tempesto sur Aconagua"/ estas la titolo de slovaklingva traduko de verko, kies aŭtoro estas la mondkonata esperantisto kaj vojaĝisto TIBOR SEKELJ /naskita en Slovakio/. La libro priskribas streĉan grimpon sur la plej altan monton de ambaŭ Amerikoj, dum kiu la

ekspediestro kun sia edzino pereis en neĝoŝtormo. Sur la paĝo 149 estas mencio pri Esperantista flageto, kiun Sekelj lasis sur la montosupro. - Eldonis Osveta, Martin; Kĉs 18,70. Ni rekomendas al niaj legantoj. - jm

Peter Giunio; SEKRETOJ DE LA MARESTAĴOJ /reverkita de Marinko Ĝivoje/
Eldonis Kroata Esperanto-servo en jaro 1960. Formato 15x22, 114 paĝoj, 73 bildoj/kelkaj plurkoloraj/. Prezo 500 din. aŭ egalvaloro. Adreso de la reverkinto: Marinko Ĝivoje, poŝtfako 18, Ljubljana 13 /Jugoslavio/.

JUNULARA KANTARETO de Josef Cink

aperis fine de la jaro 1960 en Ostrava. Ĝi estas vera surprizo, ĉar jam longe io simila ne estis en ĉeĥoslovakio eldonita. La enhavo bone respondas al la ideo de nia movado. Estas 54 kantoj ĉeĥaj, slovakaj kaj el la tuta rondo. Granda avantaĝo estas la muziknotoj, ĉe ĉiu kanto. Kompilis Josef Cink, eldonis Esperanto-rondeto de ROH en Ostrava-Poruba kiel unuan kajeron de eldonejo de Fajrero. Presita per ofseto, formato 21 x 14,7 cm, 46 paĝojn. La broŝureto kostas Kĉs 5,-. Ni rekomendas al ĉiuj samideanoj. Mendebila ĉe: E-rondeto de ROH n.p. Bytostav, Ostrava 16-Poruba.

LASTA GRAVA INFORMO!

Universala Esperanto-Asocio estis proponita kandidato por la Nobel-pacpremio 1961 fare de pluraj ministroj, deputitoj, sciencistoj kaj elstaraj personoj de dudeko da landoj.

LA MUZIKA LINGVO KAJ ASTRONAŬTOJ

La romano de hungara verkisto Frigyes Karinthy "Vojaĝo al Faremido", kiu aperis en la jaro 1960 en SNKLHU /Ŝtata eldonejo de beletro, muziko kaj arto/, priskribas per apokrifmaniero la vojaĝon de Gulliver al la planedo, kies perfektaj estaĵoj, liberaj de ĉiuj instinktoj, parolas lingvon, kiu konsistas el tonoj de la skalo. «lam la nomo de la planedo konsistas el tonoj fa-re-mi-do, dum ĝiaj enlogantoj nomiĝas sol-la-si-anoj.

La lingvon de la Sollasianoj konsideras la leganto certe kiel kreaĵo de fantazio de la poeto; tamen li estus surprizita, se li ekscius, ke tiu ĉi lingvo fakte ekzistas - eĉ kiam, kaj eble feliĉe, oni ĝin ne parolas. Tiun ĉi lingvon oni povas ellerni el la lernolibro de Jean Francois Sudre "Langue musicale universelle par le moyen de laquelle /apres seulement trois mois d'étude/ tous les differents peuples de la terre, des aveugles, les sourds et les muets peuvent se comprendre réciproquement" /"Universala muzika lingvo, helpe de kiu - post tri monatoj de lernado - ĉiuj diversaj homoj de la mondo, blinduloj, surduloj kaj junuloj, povas reciproke interkompreniĝi"/, kiu aperis en Parizo en la jaro 1866. Ĝia aŭtoro estis franca profesoro Jean Sudre, kiu de la jaro 1817 sen interrompo okupiĝis pri la ideo krei internacian lingvon sur bazo de sep tonoj de la muzika skalo. La principo de la lingvo estas tre sprita: per kombinado de sep tonoj estas formataj bazaj vortoj laŭ difinita sistemo /ekz. unusilabaj vortoj formas erojn, dusilabaj prononcojn, plimulto da vortoj estas trisilabaj kaj kvarsilabaj vortoj estas derivaĵoj. Gramatikajn formojn oni faras per ripetado de la silaboj aŭ per helpaj eroj. La vortaro estas ampleksigebla laŭ difinitaj reguloj: la malon oni povas esprimi per renverso de la silaboj: sol-la-si signifas supreniri, sil-la-sol malsupreniri, mi-sol- estas bono, sol-mi estas malbono.

La projekto Sol-re-sol vekis atenton de la plej alta scienca institucio, Institut de France, dum la mond-ekspozicio en la jaro 1855 ĝi gajnis premion de 10 000 frankoj, aĉetis ĝin la franca armeo, ĉar oni povis eluzi ĝin ankaŭ en la milito por kolora signalado. En Sol-re-sol oni povis interkompreniĝadi per muziko, vortoj, koloroj, numeroj; sufiĉis nur anstataŭi la sep bazajn elementojn per tonoj, silaboj, numeroj, signoj ktp. Ne estas mirinde, ke ĝi akiris admiron eĉ en rondoj artistaj kaj sciencaj: la projekton subtenis eĉ Victor Hugo kaj Lamartine, interesiĝis pri

ĝi Cherubini kaj Auber, sian simpation esprimis Alexander Humboldt. „Estas konsiderinde, kiel elstaraj aŭtoroj kaj personecoj sciis entuziasmiĝi pri projekto, kiu ĉiuokaze estas nur lingvistika kuriozaĵo kaj kiu ankaŭ malaperis sen atento komence de ĉi jarcento. Eble nur surdmutuloj okupiĝis plu kun tiu projekto, ĉar ĝi povis helpi ilin ĉe interkompreniĝo. Tial ankoraŭ en la jaro 1902 aperis gramatiko de Boleslaw Gajewski, adaptita ankaŭ por surdmutuloj.

Ekestas demando, ĉu Karinthi sciis pri la projekto Sol-re-sol; ĉio atestas, ke jes, eĉ kiam en tempo, kiam Karinthi maturiĝis, la projekto estis fakte jam mortinta. Okulfrapaj estas kelkaj similecoj en la lingvoj de la superteraj estaĵoj kaj tiu de Sol-re-sol: Ekzemple nomo de enloĝantoj de la mistera planedo "Sol-la-si-oj" signifas "tiuj, kiuj iĝis supren"; la finaĵo -mido- en la nomo de la planedo "Fa-re-mi-do" signifas en Sol-re-sol - tero. Kompreneble povas temi pri hazarda simileco; limigata ebleco de kombinado helpe de sep elementoj povas devojigi al troigaj konkludoj.

Sed tamen la muzika lingvo de Sol-la-sioj ne estas nur poeta fikcio: la estontaj astronautoj al "Faremido" povas provizi sin per perfektaj gramatiko, vortaro kaj „literaturo, kiujn por ili jam antaŭ duonjarcento elpensis la profesoro de Soreze.

Dr. Jar. Jermář

KLACĈEMA OBSERVANTO

Ĉu revoj? Ĉu songoj?

Printempo jam venis. Ĉio burĝonas /pardonu botonas/, la verda koloro videbligas. Verda koloro, la koloro de esperantistoj, la koloro de espero. Kaj espero estas revo. Venas tempo de regionaj E-kunvenoj /tio estas revo/ kaj landaj kaj internaciaj E-kongresoj /tio estas songo/. Ankaŭ pri UK oni devas pensi /nur pensi, revo+songo/, ĉar bedaŭrinde esperantistoj ne estas futbalistoj nek aliaj sportĉampionoj, tial restas al ili la revo en pli feliĉa okazo la songo. En Nuntempa Bulgario 1961/1 en "Tribuno de leganto" en artikolo sub titolo "Ni mem kulpas" inter alie mi legis: Temas pri la granda, mi dirus fundamente difekto en nia propaganda laboro, pri la hontemo sin montri esperantisto, aktive labori ĝuste en siaj profesiaj rondoj..." ktp.

Jes, ni mem estas kulpaj. Ni ne fanfaronas pri "goloj" kiel futbalistoj, kvankam nia laboro ne estas malpli serioza. Multaj kulturaj aferoj estas farataj helpe de Esperanto, sed multaj pri tio ne scias. En fakaj kunvenoj nur kelkaj kuraĝuloj konfesas sian esperantecon. Ofte samideanoj, akirintaj ian publikan sukceson, subite forgesas pri Esperanto, forgesinte, ke Esperanto iamaniere ankaŭ helpis al iliaj sukcesoj.

Kaj al ni, simplaj poresperantaj laborantoj restas revoj, en pli feliĉaj okazoj songoj, ĉar tie oni travivas revojn kvazaŭ reale.

A.S.

A T E N T U !

ESPERANTAJ PLAGETOJ - 10 x 15 cm el silka materialo, tre belaj, taŭgaj por ornamo de tabloj, montrokesteto ktp. - estas haveblaj ĉe nia klubo por Kčs 6,50. Mendojn direktu al Kluba biblioteko, Týnská strato 3, Praha 1.

NI FUNEBRAS


En decembro 1960 mortis samideano d-ro František Přibyl el Praha, membro de Esperantista Klubo en Praha de la jaro 1955.

Malgaja surprizo por multaj: Post trimonata grava malsano mortis veterano de Esperanto, pioniro Jan Zemek, longjara fakdelegito por fervojo, la sola ĉeĥa esperantisto apartenanta al la grupo de ankoraŭ vivantaj gesamideanoj el la tuta mondo, kiu li persone kontaktis al la aŭtoro de Esperanto kaj lia familio. Li forpasis en la aĝo de 65 jaroj kaj la 31-an de decembro estis enterigita en la lima urbo Rumburk.

En Hradec Králové mortis la 15-an de januaro 1961 en juna aĝo s-ino Ludmila Rejthárková, fervora kaj oferema esperantistino, konata ankaŭ el kelkaj prezentadoj de la "Verda Ĉaro".

PRAHA-GVIDLIBRO

estas jam finpresata kaj oni liveros ĝin en majo. Al la legantoj, kiuj ne legis nian anoncon el la pasinta jaro, ni klarigas, ke temas pri luksa bindita eldonaĵo poŝformata, kun ĉ.190 paĝoj, 16 tutpagaj fotoreproduktaĵoj, 16 dukoloraj kaj 27 simplaj desegnaĵoj, kun tri koloraj planoj de la urbo kaj la trafiko. Estas fakte malgranda studio pri Praha, enhavanta ankaŭ arthistoriajn eseojn kaj malnovajn legendojn. Ĉefe pro tiu karaktero ĝi taŭgas kiel bonega donaco al ekster-landaj amikoj. Prezo:Kčs 16,-.



Bedaŭrinde teknikaj malfacilaĵoj en la eldonejo limigis la eldonkvanton tiel, ke oni ne eble povos garantii liveradon al ĉiu interesiganto. Kiu el niaj legantoj volas ĝin ankoraŭ havigi al ŝi, bonvolu ĝin mendi senprokraste ĉe nia klubo, kiu disponos per certa kvanto da ekzempleroj. Al malfruiĝontaj mendantoj ni povos promesi nur alsendon de iu venonta eldono.

VI SKBIBAS - NI RESPONDAS

S-ano Josef MENDL - nia "Bulteno" estas kluba gazeto. Tamen ni zorgas informi niajn legantojn pri Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio.

S-ano Georgi LXVOROV, Bulgario - vidu la anoncetojn.

S-ano Petro POLIŜĈUK, Taŝkent, USSR, dankon por viaj bondeziroj. Ankaŭ nia deziro estas eldoni pli "dikan" gazeton. Nian "Bultenon"vi ricevados. Salutu viajn klubanojn de Esp-klubo en Praha.

S-ano Josef VRABKA - vidu la anoncetojn. Venonte skribu en Esperanto, por ke vi ekkonu vian kapablon.

S-ano J. K. CHALLINGER, Leeds 6, Anglujo, ni notis vian adreson kaj regule vi ricevados nian "Bultenon".

S-ano Klement KOTRBA - la anoncon ni repredis.

S-anoj Z.ŘEZÁČ kaj J. BALLAY - "Klaĉema observanto" respondos persone. Anoncon ni repredis.

S-ano RADOHAI Vilmos, Budapeŝto - dankon por via bondeziro. Vian adreson ni korektis.

DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

= GEORGI LIVOROV, Gabrovo, Ĉerkovna 1, 17-jara tek.lern.,dez.kor.pri divers. temoj kaj interŝanĝi PK kaj PM.

ĈEĤOSLOVAKIO :

= JOSEF VRABKA, Proseč u Skutče 48,p. Proseč, dez.kor.kun c.l.kaj inters.PM, PK,PI kaj alumetikedojn.

= JIŘÍ ŠVEC, Široký důl 12, p.Polička, dez.kor.kun ĉ.l.kaj inters.alumetikedojn, PM kaj PK.

= Z. ŘEZÁČ, Šumburk n.D.355, p.Tanvald, inters. danajn kaj svedajn PM kaj kor. kun ĝardenamatoroj ekster kaj interlandaj.

= EMÍLIA ŠIPULOVÁ, instruistino, Základná devatročná škola, Púchov, Komenského uliea,dez.kor.kun c.l.

= VILMA VOZNICOVÁ, s-ino, Kubelíkova 4, Praha 3,Žižkov, dez.kor.per IP kun o. landoj.

FRANCUJO :

= Esperanta grupo S.N.C.P. I. Rue de Paris - St. Etienne du Rouvray, Seine Maritime. - 40 gejunuloj kaj 10 plenaĝuloj dez. kor, kun gelernantoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

JUGOSLAVIO :

= SEENHGRST IVANKA, 12-jara; NENA PROTIC, 13-jara; BORĈIC IVANKA, 9-jara, MATIC IVANKA, 13-jara; BUNIEVCEVIC VELIMIR, 12-jara; ZVONKO ĈUTIĈ, 12-jara; MRGAN JASNA, 12-jara; VĚRA PROTIĈ, 12-jara; HOLUBEC MLADENKA, 12-jara; WAGNER MIRA, 12-jara; KOZARIĈ SILVA, 12-jara; LEVANAT IVICA, 12-jara; DERĈIĈ NAĎA, 12-jara, deziras,, korespondi - adreso de ĉiuj: II.osm.škola "Vladimír Nazor",- Slav.Požega, NRH, Jugoslavia.

= VERICA ŽAKULA, 12-jara kaj PETAR ŽAKULA, 14-jara - ul. Rade Končara 11, Slav. Požega, NRH, Jugosl. dez.kor.

= IVANKA KULUNIEĈ, 13-jara, ul. Rade Končara 5, Slav.Požega,NRH. Jugosl.dez. korespondi.

= VIDAS VERA, 16-jara, ul.Nikole Démonie 19, Slav.Požega,Jugosl., dez.kor.

POLLANDO :

= RAJNOWSKI JANUSZ, ul. Krsta 15, Szczecin, deziras kor. kun junuloj.

= RYSZARD BUTAJLO, ul.Holdu PruskLego n-ro 9-2, Świnoujście, voj. Szczecin, deziras korespondi.

SOVETUNIO:

= ANATOLIJ GARIFJANOV, Kurskaja II.kv. 6, Stalingrad-5, USSR, kor., inters.kun o. 1. BK, let., PI.

= A. A. POPOV, Kuzneckaja 101-A, kv.5, Stalingrad-3, USSR, Inters. BK, let., PI kun c. 1.

SOMERA ESPERANTO-TENDARO /SET/ kjp la :Esperanto-kursoj ĉe la valbaraĵlago apud Lančov okazos 16.7.-12.8.1961 en du sinsekvaj etapoj. La tuta kotizo inkluzive kurspago kaj manĝaĵo kostas Kčs 250,-. Aliĝu senprokraste je la adreso: "Okresní dům osvěty, odbor Esperanto, Třebíč".

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe Kulturcentro de ONV Praha 1. Eldonas: Kultura kaj societa centro de ONV-1. Ĉefredaktoro: J.M. Havlík, Fr.Křižka 12, Praha 7, tel.73633. Redakcia rondo: ges-anoj A.Bárochová, A. Bartošík, H. Brotánková, J. Drlík, R. Hromada, J. Ondráček, V. Pražák, d-ro T. Pumpr, A. Slanina, H. Šmidrkalová.

Administrejo: Týnská strato 3, Praha 1, Staré Město.